

Elli Weisbach,

## Rapide

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Diablo!

Ni fordiboĉas la Teron,  
ni foruzaĉas por nia amuzo  
la trezorojn de l' mondo.  
Rendimento, plezuro kaj fortaj motoroj  
ebriigas,  
narkotas la menson.  
Frenezolo!  
Ni frenezuloj!

Neniam ni estis  
al la falo en senfundon  
tiel proksimaj.  
Kia stulteco  
pelas nin  
kaj ĉiujn senkonsciajn hometojn  
al abismoj?

Rapide, rapide,  
nur ĉiam antaŭen  
nur ne paŭzi  
ne pripensu  
nepre ne pripensu.

...

Rendimento, plezuro kaj fortaj motoroj,  
je diablo, kia plezuro!  
Ni eraras! Kia stulteco!  
Proksimas la senfundo.

Sed ne paŭzu,  
rapide, rapide!  
La trezoroj de l' mondo  
ebriigas.  
La senco?  
Ne pripensu, nepre ne pripensu:  
Ni disdiboĉas la Teron kaj  
ĉiuj senkonsciaj hometoj  
al la frenezo  
kaj al ĉiuj diabloj.

*Traduko de la Germana poemo "Aber Tempo" de ELLI WEISBACH (Elvira Köhler) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-391-771 (2007-03-28 07:26:36)*